# La Bitbulteno 43

### 2018, AÑO DE ENCUENTROS EN ESPERANTO

Comienza un nuevo año, 2018, que se va a caracterizar por la abundancia de encuentros internacionales de esperanto en la Península Ibérica. En general, se pueden encontrar encuentros esperantistas, más o menos formales, durante todo el año, en los que se puede practicar el esperanto, y a la vez disfrutar de la cultura esperantista y del ambiente que ofrece la comunidad de hablantes, pero este año será algo especial en esta región del mundo.

Congreso Universal en Lisboa; Congresos Español y de la Liga Internacional de Profesores en Esperanto en Madrid; Congreso Internacional Juvenil en Badajoz... No faltarán oportunidades de disfrutar del esperanto aquí, en este rincón del sudoccidente de Europa.
Lee los detalles en nuestra web, en este enlace.

### SIGUE LA PREPARACIÓN DE LOS CONGRESOS DE JULIO EN MADRID

Podemos ya anunciar que los congresos tendrán lugar en el *Colegio Mayor Teresa de Jesús*, dentro del complejo de Colegios Mayores de la Universidad Complutense de Madrid. Parte de las actividades del Congreso de ILEI se desarrollarán en la sede de la Facultad de Filología de la UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia)

También dentro del Congreso de ILEI tendrá lugar un simposio universitario, en colaboración con la UNED. En esta página se incluye el llamamiento a profesores e investigadores que deseen tomar parte en el Simposio.

Dentro de poco publicaremos más datos sobre alojamiento, excursiones y otras informaciones prácticas. Mientras tanto, si tienes alguna duda, puedes escribir al Comité Organizador a la dirección: kongreso2018@esperanto.es.




### BUENA MARCHA DEL CONGRESO INTERNACIONAL JUVENIL DE BADAJOZ

A finales de enero terminó el primer plazo para apuntarse al Congreso Internacional Juvenil de Esperanto, que este año tendrá lugar en Badajoz, junto a la frontera portuguesa, con el resultado de más de 90 personas de cuatro continentes ya inscritas.

Las actividades tendrán lugar en la Residencia Universitaria RUCAB, donde también será posible alojarse y comer.

En enero los organizadores locales se reunieron con diversas autoridades. Nuestro compañero Carlos fue entrevistado por el programa de Radio Extremadura "El sol sale por el oeste". Puede escucharse la entrevista en este enlace.

Te animamos a venir, y, si eres joven, también te animamos a colaborar en la organización. Puedes ponerte en contacto enlas direcciones indicadas en esta web: http://ijk2018.tejo.org/es/contacto/

**RECORDAMOS A DOS EMINENTES ESPERANTISTAS**

El mes de enero se cumplió el 25 aniversario del fallecimiento de Juan Régulo Pérez, el principal editor de libros en esperanto a mediados del pasado siglo, y la Federación Española de Esperanto lo recordó con un acto en nuestra sede en homenaje a su figura con participación del presidente de la Federación, José Antonio del Barrio, y de los escritores Miguel Fernández y Jorge Camacho. También el grupo esperantista de Las Palmas de Gran Canaria organizó un modesto homenaje en esas fechas. Durante este año se prevén otras actividades de las que iremos informando.

En nuestra Bitoteko se puede encontrar numerosas obras relacionadas con el prof. Régulo, incluyendo una biografía a cargo de Leandro Trujillo: "Juan Régulo Pérez, una aproximación a su vida y obra" (en castellano). En esperanto puede leerse el artículo que "La Ondo de Esperanto" dedicó a su figura en el número de enero, y que se incluye en el libro "Nia diligenta kolegaro", recién editado, que incluye las biografías de algunos de los principales activistas de la historia de la lengua.

Por otra parte, la Federación Española de Esperanto y el grupo esperantista aragonés "Frateco" se suman a las condolencias por la muerte, el pasado 22 de enero, de Emilio Gastón, abogado y poeta, primer Justicia de Aragón tras el regreso de la democracia, miembro de una gran familia de pioneros esperantistas aragoneses y buen amigo de la lengua internacional. En la capilla ardiente se exhibió una bandera esperantista. ¡Repose en paz!



**EXPOSICIÓN EN GUARDAMAR DEL SEGURA**

Entre el día 2 y el 28 de febrero se expone en la Casa de Cultura de Guardamar del Segura (Alicante) una exposición sobre el esperanto, con los paneles diseñados por la Federación Española de Esperanto, más dos especialmente creados para esta exposición, sobre la figura de Ricardo

Codorniu, pionero del esperanto en España, creador de la ingeniería forestal, y que desarrolló una importante actividad al final de su vida en esa ciudad.

Por esta razón, el grupo esperantista de Guardamar participará también en una actividad alrededor de la fiesta del árbol, el día 18 de febrero, con el objetivo de inaugurar un rodal eco-literario esperantista.

A la inauguración de la exposición asistió el alcalde de Guardamar. Puede verse un reportaje en esta dirección.




**OTROS CONGRESOS CERCANOS**

Además de los encuentros ya mencionados, que tendrán lugar en España, no podemos dejar de mencionar otros cercanos (geográfica o culturalmente), que pueden interesar a nuestros lectores. Por supuesto, el primero es el Congreso Universal, de Lisboa. A comienzos de año ya se habían apuntado más de mil personas, de las cuales una cincuentena procedentes de España. Ver más en: https://uea.org/kongresoj/UK.

En estos momentos (entre el 11 y 17 de febrero) se está celebrando el 9º Congreso Panamericano de Esperanto (TAKE), en La Habana (Cuba), con el tema "Lenguas y culturas; educación para el desarrollo sostenible en América".

Entre el 30 de marzo y el 6 de abril tendrá lugar en Marrakech (Marruecos) el 11º Encuentro de esperanto de Oriente Próximo y Norte de África (oficialmente Mezorienta Kunveno). Es una magnífica ocasión para apoyar el movimiento esperantista de una zona donde éste es débil, y además practicar esperanto en un ambiente que se espera muy internacional. Ver más detalles en este enlace.

**MENCIONES EN MEDIOS DE COMUNICACIÓN**

Durante estas pasadas semanas se ha producido una buena cosecha de menciones en medios de comunicación.

Con ocasión de la exposición sobre el esperanto que pudo visitarse en la Casa de los Poetas de Celanova (Orense), y la charla de clausura que impartió el presidente de la Federación Española de Esperanto, José Antonio del Barrio, se publicaron sendas entrevistas con éste en el periódico provincial "La Región" y la edición de Orense de "La Voz de Galicia". Ver las versiones en red en este enlace y en este otro, respectivamente.

Uno de los organizadores del Congreso Juvenil Internacional de Badajoz, Carlos Pesquera, fue entrevistado el 11 de enero en el programa "El sol sale por el oeste" de la radio regional Canal Extremadura. Se puede escuchar en este archivo (minuto 45 de la primera hora de programa)

También aparecieron reportajes sobre la exposición en Guardamar en la televisión local y comarcal.

Un reportaje titulado «'Paroli esperanton' no es cosa del pasado» se publicó en la edición catalana del diario El Mundo.

El domingo 11 de febrero, la Televisión Vasca (ETB) emitió un reportaje sobre el Esperanto. Parte de este reportaje fue grabado en la sede del Grupo Esperantista de Bilbao y además se incluyeron entrevistas a nuestros amigos Aitor Arana y Eduardo Larrouy. El reportaje se emitió dentro del Teleberri, el principal informativo de la cadena, en euskera y en castellano.


La Voz de Ourense

Protagonista — José Antonio del Barrio, Presidente de la Federación Española de Esperanto

«El esperanto es el idioma de la amistad»

La lengua internacional creada por Zamenhof hace más de cien años sigue vigente

Aniversario. La Federación organizó en la Casa dos Poetas de Celanova, a finales del 2017, una exposición por el centenario de la muerte de Zamenhof.

## UNA PUBLICACIÓN HISTÓRICA

Se ha publicado un nuevo libro, presentado por primera vez durante el Día del Esperanto en Madrid. "Antaŭ unu jarcento" (Hace un siglo) es un conjunto de textos recogidos por SAT sobre la


Primera Guerra Mundial y el esperanto, bien sea mediante textos históricos como los testimonios de esperantistas durante el periodo bélico. La edición ha corrido a cargo de José María Salguero (Kani) y Javier Alcalde. Una entrevista con ambos puede leerse en la web de Libera Folio.

El libro puede adquirirse en los servios de venta de libros de SAT y de UEA.

**NUEVOS LIBROS EN NUESTRO CATÁLOGO**

Hemos actualizado el catálogo de venta de libros de la Federación Española de Esperanto. Con algunas novedades, como la incorporación de las traducciones de "Cien años de soledad" o "Memorias dun neno labrego", además de algún libro más de la colección "Hispana literaturo". Además de, por supuesto, diccionarios y material de aprendizaje.

Echa un vistazo y consulta sin compromiso




**ÚNETE A LA FEDERACIÓN**

Continúa abierta la campaña de afiliación a la Federación para el año 2018. Recordamos que se puede usar el formulario en red y también la hoja de inscripción, que puedes encontrar en la web. Recuerda que la cuota básica es de menos de 3 euros al mes (e incluso menos en diversos casos), que la afiliación da derecho a reducciones a algunos servicios (por ejemplo, en la inscripción a algunos de los congresos mencionados) y que (dado que HEF está declarada como asociación de utilidad pública) las aportaciones desgravan en la declaración de Hacienda.

Si tienes alguna duda, puedes escribir a la dirección administrativa de la Federación: admin@esperanto.es. Para asuntos relacionados con pagos y cuotas, tanto si eres nuevo como si ya eres socio, la dirección directa del tesorero es: financoj@esperanto.es.

**2018, JARO DE ESPERANTISTAJ RENKONTOJ EN LA IBERIA DUONINSULO**

Komenciĝas nova jaro, kiu karakteriziĝos per abundo de internaciaj renkontoj de Esperanto en la Iberia Duoninsulo. Se jam dum ĉiuj jaroj eblas ĝui la etoson de Esperanto per diversaj aktivadoj, 2018 estos speciala en tiu ĉi mondoparto.

Universala Kongreso en Lisbono; Hispana kaj ILEI-kongreso en Madrido; Internacia Junulara Kongreso en Badajoz. Ne mankos ŝancoj por ĝui Esperanton en la suda Eŭropo.

Vidu pliajn detalojn en nia retejo kaj en la sekvaj informoj.

La kongresoj havos sian sidejon en la studenta rezidejo *Teresa de Jesús*, ene de la komplekso de rezidejoj (t.n. Colegios Mayores) de la Universitato Complutense de Madrido. Parto de la aktivadoj de la Kongreso de ILEI disvolviĝos en la sidejo de la Fakultato de Filologio de la UNED (Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado)

Ankaŭ ene de la Kongreso de ILEI okazos akademia simpozio, kunlabore kun UNED. En tiu ĉi paĝo estas jam publikigita la alvoko al profesoroj kaj esploristoj kiuj deziros partopreni la Simpozion.

Ni baldaŭ publikigos pliajn informojn pri loĝado kaj aliaj praktikaj informoj. Dume, se vi havas dubojn, vi povas kontakti kun la Organiza Komitato en tiu ĉi adreso: kongreso2018@esperanto.es.

**BONA PROGRESO ANKAŬ DE LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN BADAJOZ**

Fine de januaro finiĝis la unua aliĝperiodo por la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la ekstremadura urbo Badaĥozo (Badajoz), tuj apud la portugala landlimo, kaj do plej oportune por veni post la Universala Kongreso en Lisbono. La ĝisnuna rezulto estas ke jam rezervis sian partoprenon pli ol 90 homoj el kvar kontinentoj.

La aktivaĵoj okazos en la Universitata Rezidejo RUCAB, kie ankaŭ eblos gasti kaj manĝi.

En januaro la lokaj organizantoj kunvenis kun diversaj aŭtoritatoj. Nia samideano Carlos estis intervjuita en programo de la regiona radio Radio Extremadura.

Ni kuraĝigas vin partopreni, kaj, se vi estas juna, ankaŭ kunlabori en la organizado. Vi povas kontakti nin per la adresoj listigataj en tiu ĉi retejo: http://ijk2018.tejo.org/kontaktoj/.



### NI MEMORAS DU ELSTARAJN ESPERANTISTOJN

En januaro oni kunmemoris la 25-an datrevenon de la forpaso de Juan Régulo Pérez, la ĉefa eldonisto de libroj en Esperanto meze de la pasinta jarcento, kaj Hispana Esperanto-Federacio tion memoris per prelegaro omaĝe al lia figuro, fare de la prezidanto de la Federacio, José Antonio del Barrio, kaj de la poetoj Miguel Fernández kaj Jorge Camacho. Ankaŭ en Granda Kanario la loka grupo organizis modestan omaĝon dum la kunveno de la grupo (vidu apudan foton). Dum tiu ĉi jaro ni antaŭvidas pliajn informojn, pri kiuj ni informos siatempe.

Al la omaĝo aldoniĝis la revuo "La Ondo de Esperanto" per artikolo en ties januara numero kun lia biografio; ĝi devenas el la libro "Nia diligenta kolegaro", ĵus eldonita, kiu entenas la biografiojn de kelkaj el la plej elstaraj aktivistoj en la historio de la internacia lingvo. En nia Bitoteko eblas trovi plurajn verkojn rilatajn kun prof. Régulo, inklude de biografio (hispanlingva) verkita de Leandro Trujillo: "Juan Régulo Pérez, una aproximación a su vida y obra".

Aliflanke, Hispana Esperanto-Federacio kaj la aragona grupo "Frateco" aldoniĝas al la kondolencoj pro la morto, la pasintan 22an de januaro, de Emilio Gastón, advokato kaj poeto, unua "Justicia de Aragón" (ombudsmano aŭ "popoldefendanto" en Aragono) post la reakiro de la demokratio, membro de konata familio de aragonaj esperantistaj pioniroj kaj bona amiko de la internacia lingvo. Ĉe la funebra katafalko estis elmontrita esperantista flago pro deziro de la familio. Li pace ripozu!



### EKSPOZICIO EN GUARDAMAR DEL SEGURA

Inter la 2a kaj la 28a de februaro estas montrata en la Kulturdono (*Casa de Cultura*) de

Guardamar del Segura (provinco Alikanto, Valencilando) ekspozicio pri Esperanto, per la paneloj kreitaj de Hispana Esperanto-Federacio, plus du speciale kreitaj por tiu ĉi ekspozicio, pri la personeco de Ricardo Codorniu, pioniro de Esperanto en Hispanio, kreinto de la forsta inĝenierado, disvolvinta gravan aktivadon en tiu urbo je la fino de sia vivo.

Tial, la grupo esperantista de Guardamar partoprenos ankaŭ en aktivado ĉirkaŭ la festo de la arbo, la 18an de februaro, kun la celo inaŭguri esperantistan eko-literaturan bosketon (vidu aldonan bildon).

La inaŭguron ĉeestis la urbestro de Guardamar. Eblas spekti raporton en tiu ĉi adreso.




**ALIAJ PROKSIMAJ KONGRESOJ**

Krom la jam menciitaj kongresoj okazontaj en Hispanio, ni ne povas ne mencii aliajn proksimajn (geografie aŭ kulture), kiuj certe interesos niajn legantojn.

Kompreneble, la unua devas esti la Universala Kongreso en Lisbono. Komence de la jaro, jam estis aliĝintaj pli ol mil homoj, el kiuj 50 venontaj el Hispanio. Vidu pliajn detalojn en: https://uea.org/kongresoj/UK.

En tiu ĉi momento (konkrete, de la 11a ĝis la 17a de februaro) oni okazigas la 9an Tutamerikan Kongreson de Esperanto (TAKE), en Havano (Kubo), kun la ĉeftemo “Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj".

Inter la 30a de marto kaj la 6a de aprilo disvolviĝos en Marakeŝo (Maroko) la 11a Mezorienta Kunveno. Temas pri bonega okazo apogi la esperantan komunumon en areo (norda Afriko kaj arabaj landoj) kie tiu ĉi estas tre malforta, kaj krome praktiki Esperanton en etoso kiun oni antaŭvidas tre internacia. Vidu pliajn detalojn en tiu ĉi ligilo.

**MENCIOJ EN AMASKOMUNIKILOJ**

Dum pasintaj semajnoj oni rikoltis bonan kolekton de mencioj pri Esperanto en amaskomunikiloj.

Okaze de la ekspozicio pri Esperanto kiun oni povis viziti en la Domo de la Poetoj de Celanova (Orenso), kaj la prelego per kiu ĝin fermis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, estis publikigitaj du intervjuoj al tiu ĉi en la provinca ĵurnalo "La Región" kaj la regiona "La Voz de Galicia". Legu la retajn versiojn en jena kaj jena respektivaj ligiloj.

Kiel jam menciite, unu el la organizaj respondeculoj de la Internacia Junulara Kongreso de Badajoz, Carlos Pesquera, estis intervjuita la 11an de januaro en la programo "El sol sale por el oeste" de la regiona radio Canal Extremadura. Eblas aŭskulti la intervjuon en tiu dosiero (minuto 45 de la unua horo de la programo)

Ankaŭ pri la ekspozicio en Guardamar aperis raportoj en la loka kaj distrikta televidoj.

Raporto titolita «'Paroli esperanton' no es cosa del pasado» (tiel, kun la komenco de la titolo en Esperanto) estis publikigita en la kataluna eldono de la ĵurnalo El Mundo.

La sabaton 10 de februaro, la Eŭska Televido (ETB) elsendis ampleksan raporton pri Esperanto. Parto estis registrita en la sidejo de la Esperantista Grupo de Bilbao kaj krome estis intervjuitaj Aitor Arana kaj Eduardo Larrouy. La raporto estis elsendita en la Teleberri, la ĉefa informprogramo de la stacio, en la hispana kaj la eŭska lingvoj.




**HISTORIA VERKO**

Fine de la jaro estis publikigita nova libro, unuafoje prezentita dum la Zamenhof-festo en Madrido. "Antaŭ unu jarcento" estas kolekto de tekstoj eldonita de SAT pri la Unua Mondmilito kaj Esperanto, pere de historiaj tekstoj aŭ de atestoj de esperantistoj dum la milita periodo. La redaktistoj estis José María Salguero (Kani) kaj Javier Alcalde, kun kiuj eblas legi intervjuon en la retejo de Libera Folio.

La libron eblas akiri en la Libroservoj de SAT kaj de UEA.






**NOVAJ LIBROJ EN NIA KATALOGO**

Nia aktualigis la katalogon de vendo de libroj de Hispana Esperanto-Federacio, kun kelkaj novaj aldonoj, kiel la tradukoj de "Cien años de soledad" (Cent jaroj da soleco) kaj "Memorias dun neno labrego" (Memoraĵoj de kampara knabo) plus pliaj de la kolekto "Hispana literaturo". Krom, kompreneble, vortarojn kaj lernolibrojn.

Aliru la [retejon](), kaj demandu senprobleme, se vi deziras alian materialon.




**VENU, ALIĜU AL HEF!**

Restas malferma la kampanjo por aliĝi al Hispana Esperanto-Federacio por la jaro 2018. Memoru ke oni povas uzi la retan formularon kaj ankaŭ la paperan version troveblan en nia retejo. Ni ankaŭ rememorigas ke la baza kotizo estas malpli ol 3 eŭroj monate (kaj eĉ malpli en diversaj kondiĉoj), ke la aliĝo donas rajton profiti diversajn avantaĝojn (interalie, rabatojn en iuj el la kongresoj menciitaj antaŭe), kaj ke (tial ke HEF estas asocio de publika utileco) la monkvantoj donacataj estas dedukteblaj en la fiska deklaro.

Se vi havas dubojn, skribu al la administra adreso de la Federacio: admin@esperanto.es. Por aferoj rilataj al kotizoj, memoru ke la adreso de la kasisto estas: financoj@esperanto.es.